Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

17/07/2012 Sesdekdua Eldono 2012 17/07/2012 SENDITA

Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else

La informa kaj noma paĝoj nur aperos en la dekaj eldonoj

LA ĜENERALA PARTO

GRAVAJ DATOJ (se erara, informu min. rspring@tpg.com.au)

La AEA-jarkongreso okazos en Brisbane 28 septembro ĝis 1 oktobro 2012,

La AEA-somerkursaro en Sidnejo estos 11 ĝis 28 januaro 2013.

Esperanto havos 125 jarojn la 26an de Julio, 2012

E. DOMO en Sidnejo: Dimanĉon 29an Julio 2012 je 12a meztage

ESPERANTO KAFO KLUBO DE KANBERO (EKKK)

Saluton Roger,

Mi kredas/esperas/fidas ke vi havas la nomon kaj retadreson de Steven Landman. Sed mi kredas ke vi ne havas la nomon kaj adreson de nia plej nova samideano Giles Thomson kiu komencis lerni en januaro kaj mirinde progresas. Li nun parolas tre flue, mi opinias almenaŭ tiom flue kiel mi! Mi petas ke vi aldonu lian retadreson al via listo por ke li ricevu viajn novaĵleterojn:


Se vi ankoraŭ mencias la lokojn kaj tempojn de grupkunvenoj, eble vi povos aldoni ke la Esperanto Kafo Klubo de Kanbero(EKKK) devis translokiĝi ĉar la estro de la kafejo en kiu ni kunvenis decidis fermi sian kafejon je la 5a ptm vendrede. Post provsidoj en kelkaj aliaj kafejoj, la EKKK nun

kunsidas ĉiujn vendredojn je la 5a ptm en Cafe Fontaine kiu troviĝas en la plej supra nivelo de la Canberra Centre. Ĉiuj esperantistaj vizitantoj estos ege bonvenaj. Kontaktu Huigh Malcolm huighm@gmail.com aŭ skajpu huighm

Amike kaj kun multaj dankoj pro via netaksebla laboro,
Huigh en Kanbero

NUNONIA NOVAĴA ĴURNALO HALTIS

Komence de februaro de 2012 esperantisto Cândido Ruiz, kunlaboranto de Flavio Rebelo, publike anoncis planon lanĉi la 24-an de februaro 2012 kun Rebelo novan portalon, nomatan Nunonia[3], kiu fariĝu anstataŭanto de Ĝangalo. La retejo tamen fermiĝis nur post dumonata funkciado, la 23-an de aprilo 2012, laŭdire pro malapero de la redaktisto Ruiz kaj pro seniluziiĝo pri la esperanto-movado fare de Rebelo, kiu tiuokaze anoncis sian "oficialan" kabeon. sendis Nicole[4][5]



Mil naŭcent okdek kvar (1984)

de *George Orwell*

Karaj gesamideanoj,
Meze de julio aperis la Esperanto-versio de la libro 1984 de George Orwell. Tradukis nia amiko Donald Broadribb.http://www.librejo.com/1984/ informis, Nicole

SUBTENU RADION 3ZZZ **$15 jare** sed nur $10 por pensiuloj

Por aliĝi eblas elŝuti formularon el la retejo de 3ZZZ www.3ZZZ.com.au

LA VENONTA AEA BALOTADO

Legu pri la kandidatoj, Pensu zorge.
AEA prizorgas la hereditan monon de mortintaj malavaraj Esperantistoj. Do la balotado tre gravas. Aliĝu al AEA

Nur 2012/2013 AEA membroj, kiuj aliĝas antaŭ la 31a de julio rajtos voĉdoni. ???

Kio estas la procedoj por la voĉdonado ??
Kie kaj kiam ni scios la leĝajn limdatojn por voĉdonadi ??
Ĉu AEA subtenas malfermatan elektan procedon?
Kiu povas respondi? Kiu volas respondi? rspring@tpg.com.au

La nuna Estraro de AEA (bezonas sep direktorojn)

GRUPO UNUA

Dianne Lukes | Prezidanto
Suzanne Corry | Financa **Direktoro**
La nomo Corry ne estas sur la AEA membrolisto de 2011/2012.

Laŭ la nova statuto la estraro elektis Steve Pitney. kiel la sekretarion de AEA

Ĝisnunaj kandidatoj por la nova estraro 2012-2014

GRUPO DUA

Sandor Horvath	Prezidanto	vidu AE50, 57
Gordon Coleman	Edukado	vidu AE50, 51 54 55 57 59
Indrani Beharry-Lall	Financoj	vidu AE50, 57
Kam Lee	Administrado	vidu AE50
Heather Heldzingen	Servoj	vidu AE59

INDIVIDUOJ NE JE GRUPO


Magaret Chaldecott Utiligado? antaŭe erare estis informado

Returning officer has received the nomination — nigraj literoj
Returning officer has **NOT?** received the nomination — grizaj literoj

http://www.esperanto.org.au/aea/official-documents



(klaku)





La post Tathra AEA statuto

Ĉu vere leĝa?

Mi legis ĝin kaj nun komprenas kial ne estas multaj membroj de AEA.
Sed, kiuj permesis tian malbonaĵaĉon, kiu detruis nian AEA?
Reiru al la antaŭa leĝa statuto. Mi havas kopion.
Petu min rspring@tpg.com.au kaj mi plusendos la antaŭan statuton.
Ĉu fakte dutriono de la tiama AEA tutmembraro aprobis la ŝanĝojn por leĝigi la post Tathra statuton? Mi ne voĉdonis. Ĉu vi?

Se vi kredas, ke ne estis taŭga la antaŭa leĝa statuto, faru la sekvanton :

Remove from the Constitution the clauses (ix)5, (ix)8.1, (ix)8.3, (x)2, (xi)1.4, (xv)all, (xvi)all, (xxiii)4, (xxiii|)10, (xxiii)11. (xxiv)7

Remove the following from the following clauses

(viii)3 The Board may restrict the manner and times at which such inspections may take place.

(xiii)2 by appointment with the Company Secretary.

(xxiv)7 Should the number of Board members fall below the quorum, the remaining Board members may act only to appoint new Board members.

Ĉu estas aliaj malbonaj partoj??

LEGU la nunan statuton kaj mem pensu pri problemoj de AEA

Please note that all nominees, nominators and members wishing to vote in this election must be current members as of 31 July 2012. informis **Kam Lee**

Ĉi voĉdono estas tre grava. Aliĝu al AEA antaŭ 31 julio 12